La 40-a JUBILEA ĈEBALTA ESPERANTISTA PRINTEMPO

INFORMILO

INFORMACJE

Pola Esperanto-Asocio Filio en GLIWICE organizas denove en la tagoj 12-23 de junio 2018 jaro - la 40an ĈEBALTAN ESPERANTISTAN PRINTEMPON kun riĉa kaj varia PROGRAMO. Tiu ĉi tradicia, jubilea internacia E-aranĝo okazos denove en la atrakcia ripozloko MIELNO, pitoreske situanta inter la BALTA MARO kaj Jamno – lago, 12 km nordokcidente de la distrikta kaj vizitinda urbo KOSZALIN.

Ni antaŭvidas kiel ĉiam partoprenon de eksterlandanoj.
Pri atrakcio de MIELNO decidas ĉefe la naturaj valoroj: sablorica strando kun altiĝantaj dunoj, verda strio de pinarbaro, granda lago kaj saniga mikroklimato kun aero saturita de jodo. Ne mankas en Mielno distraĵoj, oni povas tie agrable sin amuzi.

En la programo de la 40a ĈEP troviĝos: interesaj prelegoj kun videofilmoj, prezentado de interesaj fotoj, lingvoperfektigado por komencantoj kaj progresintoj, komuna kantado, dancado, libera tribuno de gastoj kaj promenado laŭlonge de la marbordo. Tiuj kiuj venos nur por ripozi ĉe Balta Maro havos tiun eblecon ĉiutage.

Antaŭtagmeze ĉiuj havos sufiĉe da tempo por regeneri sian sanon dum **aktiva ripozado:** promenado, naĝado, sunbruniĝado. Oni povas ankaŭ sunumi sur la proksima strando, kreanta veran paradizon por naturamantoj. En Mielno eblas naĝi en kvar tegitaj naĝejoj kun varmigata marakvo, sed tiu plezuro estas aparte pagenda. Ĉiu povas malmultekoste pruntenpreni jakton, remboaton aŭ akvobiciklon por agrable navigi tra Jamno-lago. Eblas ankaŭ viziti la lagon sur la ferdeko de atrakcia promenŝipo kaj de elŝipiĝejo per urba buso veturi al Koszalin.

Esperantistoj el diversaj landoj havos okazon prezenti propran programon. Ni petas do kunporti al MIELNO diversajn esperantaĵojn, kasedojn, KD-jn kun belaj kanzonoj, E-videofilmojn, ktp. **Ni atendas ankaŭ vian bona humoron en Mielno.**

L O Ĝ L O K O: GASTAMA RIPOZCENTRO de POPOLAJ SPORTTEAMOJ. ADRESO: 76-032 MIELNO, str. Mickiewicza 3. (facile atingebla per busetoj el Koszalin). Tiu ĉi ripozcentro, nomata estas ankaŭ **Sporta Hotelo.** Ĝi konsistas el **5 duetaĝaj domoj kun sunterasoj**, Ĝi estas ĉirkaŭbarita kaj garantias al ĉiuj aŭtoposedantoj sekuran aŭtoparkon. Ripozloko situas **ĉ. 150 m** de JAMNO-lago kaj **ĉ. 80 m de la sabloza pitoreska strando**

L O Ĝ K O N D I Ĉ O J: Loĝado ĝenerale en dulitaj, bone ekipitaj ĉambroj kun propraj lavujoj. En ĉiu koridoro estas po **4 ĉambroj** kaj **2** duŝejoj.Surloke eblas saŭni, bilardi, kafumi ktp. (tarifo A)

En novrenovigita parto (super la manĝejo + apuda domo) eblas **loĝi en ĉambroj kun propra duŝejo**. (tarifo B) .

En ripozejo troviĝas: bonega manĝejo, kunvenejo, diskejo kaj florornamita korto kun multaj sidlokoj por ripozi, babili, kanti. En la ripozcentro ne ekzistas unulitaj ĉambroj.

PARTOPRENKOTIZO: inkluzivas oportunan loĝadon, bongustajn manĝojn (tri manĝoj potage) kaj riĉan E-programon, sed bedaŭrinde nenian sanasekuron.

PARTOPRENKOTIZO VARIAS DEPENDE de loĝĉambroj kaj egalas al:
220 eŭro (ĉ.950 PLZ) ĉambroj kun lavejo (tarifo–A)
310 eŭro (ĉ.1300 PLZ) ĉambroj kun propra duŝejo (tarifo-B)
Aliĝilon sendu ĝis la 15a de majo 2018.
Post la 15a de majo 2018 jaro ni ne garantias akcepton de aliĝiloj.

A L I Ĝ M A N I E R O : Plenumitan aliĝilon oni devas sendi kiel eble plej frue al:
Pola Esperanto-Asocio O/Gliwice, 44- 101, GLIWICE-1, skr. poczt. 21.
Eblas ankaŭ sendi ĝin rete al ĈEP-organizanto.
Poloj devas sendi ankaŭ devigan antaŭpagon (200,- PLN) al la supra adreso per poŝtmandato.

La aranĝo komenciĝos de la vespermanĝo (la 12an de junio - mardo) kaj finiĝos post la tagmanĝo (la 23an de junio - sabato).
A L V E N O : Oni povas veni Mielnon jam la 11an de junio (lunde) post la interkonsento kun direkcio de ripozejo. (aparta pago)

FORVETURO : Oni povos forveturi la 24an de junio (dimanĉo) – post la interkonsento kun direkcio de ripozejo. (aparta pago)

KARAJ GESAMIDEANOJ, ne perdu la okazon, venu MIELNON kaj partoprenu la 40-an jubilean ĈEBALTAN ESPERANTISTAN PRINTEMPON.
La aranĝo verŝajne impresos vin forte pro neripetebla esperantista etoso kaj pro interesa kaj riĉa E-programo. Dum la aranĝo vi povos profundigi vian lingvokonon, ligi novajn amikajn kontaktojn kaj **agrable pasigi la tempon ĉe la Balta Maro**. **Memoru, ke oni povas aliĝadi rete. Tiun ĉi informilon sekvas aliĝilo, kiun vi povas senprobleme kopii por viaj gefamilianoj aŭ geamikoj. Por iuj ni sendos la informojn pri la aranĝo en kovertoj. Estu do tre afablaj kaj sciigu viajn geamikojn pri la 40a ĈEP en Mielno. Ni anticipe dankas vin pro via afableco.**

KORESPONDADRESO: POLA ESPERANTO-ASOCIO Filio en Gliwice,
skr. poczt. 21, 44-101 Gliwice -1 Pollando,
Poŝtelefono al ĈEP – organizanto (en Gliwice): +48/660 427 967
RETADRESOJ: stanislaw.mandrak@gmail.com **aŭ** staman@ka.onet.pl

Memoru, ke tiu ĉi INFORMILO TROVIĜAS ANKAŬ EN NIA RETEJO: www.esperanto.cba.pl La informilon sekvas aliĝilo, kiun oni povas senprobleme kopii aŭ tuj plenumi kaj resendi al mi. Bonvolu pri la 40a ĈEP ankaŭ informi Viajn familianojn, amikojn kaj gekolegojn.

Ĝis la renkontiĝo junie en Mielno.
ĈEP ĉeforganizanto

Stanisław Mandrak